

# Koko kaj Milpiedulo

## Chicken and Millipede

 Winny Asara

 Magriet Brink

 dohliaM

 3

 Esperanto  / English



Koko kaj Milpiedulo estis amikoj. Sed ili ĉiam konkuris unu kontraŭ la alia. Iun tagon ili decidis ludi futbalon por vidi, kiu estis la pli bona ludanto.

...

Chicken and Millipede were friends. But they were always competing with each other. One day they decided to play football to see who the best player was.



Ili iris al la ludkampo kaj ekludis. Koko estis rapida, sed Milpiedulo estis pli rapida. Koko piedbatis malproksimen, sed Milpiedulo piedbatis pli malproksimen. Koko eksentis sin malkontenta.

...

They went to the football field and started their game. Chicken was fast, but Millipede was faster. Chicken kicked far, but Millipede kicked further. Chicken started to feel grumpy.



Ili decidis ludi punŝoton. Unue, Milpiedulo estis la golulo. Koko gajnis nur unu golon. Tiam estis la vico de Koko gardi la golejon.

...

They decided to play a penalty shoot-out. First Millipede was goal keeper. Chicken scored only one goal. Then it was the chicken's turn to defend the goal.



Milpiedulo piedbatis la pilkon kaj faris golon.  
Milpiedulo piedbatis la pilkon kaj faris golon.  
Milpiedulo kapbatis la pilkon kaj faris golon.  
Milpiedulo gajnis kvin golojn.

...


Millipede kicked the ball and scored. Millipede  
dribbled the ball and scored. Millipede headed the  
ball and scored. Millipede scored five goals.



Koko koleregis, ĉar ŝi perdis la ludon. Ŝi estis tre malbona perdanto. Milpiedulo ekridis, ĉar lia amiko faris tiom da bruo pri tio.

...

Chicken was furious that she lost. She was a very bad loser. Millipede started laughing because his friend was making such a fuss.



Koko tiel koleris ke ŝi larĝe malfermis la bekon kaj forglutis la milpiedulon.

...

Chicken was so angry that she opened her beak wide and swallowed the millipede.



Dum Koko marŝis hejmen, ŝi renkontis Milpiedul-patrinon. Milpiedul-patrino demandis, “Ĉu vi vidis mian infanon?” Koko nenion diris. Milpiedul-patrino maltrankviliĝis.

...

As Chicken was walking home, she met Mother Millipede. Mother Millipede asked, “Have you seen my child?” Chicken didn’t say anything. Mother Millipede was worried.





Tiam Milpiedul-patrino aŭdis voĉeton. “Helpu min, panjo!” kriis la voĉo. Milpiedul-patrino ĉirkaŭrigardis kaj aŭskultis atente. La voĉo venis el ene de la koko.

...

Then Mother Millipede heard a tiny voice. “Help me mom!” cried the voice. Mother Millipede looked around and listened carefully. The voice came from inside the chicken.



Milpiedul-patrino ekkriis, “Uzu vian specialan povon, mia infano!” La milpieduloj povas fari malbonan odoron kaj malbonan guston. Koko eksentis sin malsana.

...

Mother Millipede shouted, “Use your special power my child!” Millipedes can make a bad smell and a terrible taste. Chicken began to feel ill.



Koko ruktis. Tiam ŝi glutis kaj kraĉis. Tiam ŝi ternis kaj tuisis. Kaj tuisis. La milpiedulo estis naŭzega!

...

Chicken burped. Then she swallowed and spat. Then she sneezed and coughed. And coughed. The millipede was disgusting!



Koko tuisis, ĝis ŝi eltusigis la milpiedulon kiu estis en ŝia stomako. Milpiedul-patrino kaj ŝia infano suprenrampis sur arbo kaj kaŝis sin.

...

Chicken coughed until she coughed out the millipede that was in her stomach. Mother Millipede and her child crawled up a tree to hide.



Ekde tiam la kokoj kaj la milpieduloj estis malamikoj.

...

From that time, chickens and millipedes were enemies.






# Global Storybooks

[globalstorybooks.net](http://globalstorybooks.net)

**Koko kaj Milpiedulo**

**Chicken and Millipede**

 Winny Asara  
 Magriet Brink  
 dohlam (eo)

